La orientlitovia urbo Visaginas situas proksime de landlimo kun Belorusio. En la urbo loĝas 30000 loĝantoj de pli ol 40 naciecoj, do, ĝi estas multnacia urbo kun belegaj pinarbaroj. La urbo estas fondita en 1975 kaj estas la plej juna urbo de Litovio. Ĝi situas sur bordo de lago Visaginas nur 6 kilometrojn for de fama Ignalina nuklea elektrocentralo, kiu ĉesos funkcii fine de 2009. La urbon de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas belegaj regionaj kaj naciaj naturparkoj. Ĉirkaŭe je 10 kilometroj de la urbo estas 110 lagoj kaj lagetoj de diversa grandeco. Tiu-ĉi regiono pro arbaroj kaj montetoj estas nomata Litovia Svislando kaj pro abundaj lagoj Litovia Finnlando. Tra Visaginas iras unu el la plej gravaj internaciaj fervojlinioj de Litovio (Sankt-Peterburg – Daugavpils – Vilnius – Varsovio – Berlino). BET-46 funkcios en moderne kaj bonege ekipita Profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado (str. Festivalio 7). Partoprenantoj de BET-46 libere povos uzi ĉiujn ejojn kaj servojn de la Studcentro (salonoj, aŭditorioj, teknikajoj kun libera reta aliro, videoekipaĵoj k.s.).

BET-46 funkcios la 26-an de Junio – la 4-an de Julio, 2010. Veni eblas jam la 25-an de Junio. Antaŭ kaj post BET-46 estas ebleco laŭ moderaĵ prezoj aktive ripozi en proksime de Visaginas funkciantaj vilaĝaj altkvalitaj turismejoj kaj ripozejoj. Interesiĝantoj pri tio bonvolu aparte

peti informojn ĉe Organiza komitato.

Aliĝkotozito ĝis la 31.12.2009 estas 60 lidoj por okcidentanoj, kiel finnlandanoj. De 01.01 aliĝkotozito kreskas al 75 lidoj kaj ekde la 01.04.2010 al 90 lidoj. Infanoj, lernantoj kaj studentoj aliĝkotoziton ne pagas. Unu eŭro egalas al 3,45 lidoj, la kurzo estas konstanta. Aliĝiloj riceveblas ĉe LEA – kontaktinformoj sube.

Loĝado: 1) en dultitaj kaj trilititaj ĉambroj en apuda komunloĝejo unu lito por unu tagnokto kostas 20 lidojn. 2) eblas mendi ĉambrojn en urbaj hoteloj. Prezoj estas proksimume 10-oble pli grandaj ol en komunloĝejo. Petu informojn aparte. 3) laŭdezire por junularo eblas aranĝi amasloĝejon. Prezo anoncota.

Programo estos tradicia, t.e. somera universitato, kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri Esperanto-movado, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, libroservo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj k.a. Organiza komitato atendas proponojn, ofertojn, ankaŭ sinproponojn.

Fine de majo 2010 ĉiu aliĝinto ricevos Informilon nr. 2. Ni antaŭvidas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de la aranĝo. Aktualajn informojn Vi povas trovi en retejo www.esperanto.lt, informojn pri urbo Visaginas en www.visaginas.lt (bedaŭrinde nur en litova, rusa kaj angla lingvoj).

Aliĝ-kontaktadreso: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Stradreso de LEA estas: str. L.Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 kaj +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: litova.ea@mail.lt; pjedorovas@takas.lt kaj irenaa@takas.lt.

(el Informilo nr. 1 redaktis mm)

120 vizitis ĉe CO

La vivo kaj verko de Ivo Lapenna estis temo de la 31-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de novembro. Tiu ĉi populara aranĝo okazis tri semajnojn post la 100-a naskiĝdatreveno de Lapenna (1909–1987) kaj allogis 120 vizitantojn el 16 landoj.

La ĉefpreleganto estis prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. Li parolis pri siaj renkontiĝoj kun Lapenna, kiun li, denaska esperantisto, ekkonis kiel juna knabeto, ĉar Lapenna ofte gastis en la familio de la famaj italaj esperantistoj Luigi kaj Carolina Minnaja. Pri siaj kontaktoj kun Lapenna parolis ankaŭ prof. Duncan Charters, vicprezidanto de ILEI.

La publikon plene kaptis la frisa grupo Kapriol', kiu krom mem kanti, kantigis kaj eĉ dancigis la publikon. Biblioteko Hodler funkciis kiel kinejo de dokumentaj filmoj.

La sekva Malferma Tago estos en sabato, la 17-a de aprilo 2010. La ĉefpreleganto estos d-ro Mark Fettes.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Elekto de UEA-gvidantoj komencita

En 2010 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2010-2013. Parto de tio estos elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM je la 31-a de decembro 2009 oni elektos ses komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) preskribas: “Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la mova-

daj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.”

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo ĝis la 28-a de februaro 2010. Validaj estos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj aŭ retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 2008 kaj 2009) kaj resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon en la periodo 2004–2009, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol ses validaj kandidatoj, oni konsideros ĉiujn elektitaj. Se ili estos pli multaj, la individuaj membroj ricevos voĉdonilon por elekti siajn reprezentantojn per poŝta balotado.

*Osmo Buller
Ĝenerala Direktoro de UEA*

Kortega hotelo de UEA esperantumas

Hotelo Van Walsum en Roterdamo havas unikan lokon en la historio de Esperanto: ĝi gastigis praktike ĉiujn prezidantojn kaj estraranojn de UEA de la lastaj 50 jaroj kaj multajn aliajn movadajn eminentulojn. Ankaŭ por aliaj esperantistoj tiu hejmeca familia hotelo estis natura elekto dum vizitoj al la movada ĉefurbo dank' al ĝia tradicia reklamo en la Jarlibro kaj proksimeco al la CO. La hotelo situas ĉe la bela parkstrato Mathenesserlaan je nur 3-minuta piediro de la sidejo de UEA.

Sojle de la novembra Malferma Tago, Hotelo Van Walsum aldonis al la lingvaro de sia retejo ankaŭ Esperanton. Kelkaj menueroj ankoraŭ ne estas tradukitaj, sed la ĉefa enhavo jam estas legebla en Esperanto. La Esperantan sekcion oni povas aliri klakante sur la Esperanto-flago en www.hotelvanwalsum.nl.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Antaŭen informas

♦ Antaŭen somere ricevis junan kaj talentan membron Markus Sunela. Li pretigis al la societo novan hejmpaĝon <http://www.sunela.eu/antauxen/Etusivu>. Tamen <http://www.kolumbus.fi/veli.hamalainen> funkcias ankoraŭ. Bonvolu konatiĝi kun ili.

♦ Ni decidis ekuzi streketon en la esperanta nomo de la societo, Esperanto-societo Antaŭen.

♦ La 16.11. estis elektitaj sekvaj funkciuloj por la societo:

prezidanto Tapani Aarne

vicprezidanto Jukka Laaksonen

kasisto Tapani Aarne

sekretario Sylvia Hämäläinen

♦ Nia programo en vintro kaj printempo 2010 estos

11.1. La familio Zamenhof, Jukka Laaksonen

8.2. Lingvaj nuksoj, Sylvia Hämäläinen

22.2. Jarkunsido

8.3. Literatura vespero, Markus Sunela

12.4. Kubo kaj UK

Ĉiuj kunvenoj okazos en Nesto, Satakunnankatu 30 C 6 je la 17a. Gastoj estas bonvenaj.

Krome ni intencas partopreni en Vintraj Tagoj de EAF kaj ekskursi en Nokia en majo, la dato estas nedecidita ankoraŭ. Marjatta Ström, noki-aano, gvidos nin.

La someraj ĉiulundaj renkontiĝoj en la ĉefbiblioteka kafejo okazos inter la 24a de majo kaj 23a de aŭgusto. Ni ĝojas pri gastoj, bonvenon!

Markus Sunela kolektis grupon el inter universitataj studentoj por studi esperanton. Ili kunvenas en Nesto. En printempo ili aranĝos FEJO-semajnfinojn en Tampere.

Sekretario Sylvia Hämäläinen

Esperanto-ekspozicio en Turku januare

Esperanto-societo en Turku aranĝos kunlabore kun la biblioteko ekspozicion pri Esperanto en la ĉefbiblioteko de la urbo. La ekspozicio troviĝos en *Tietotori* (informa bazono) en la dua etaĝo de la konstruaĵo. La tempo por la ekspozicio estas 5.–31.1.2010 kaj la temo *Esperanto – kiehtova kieli* (fascina lingvo).

Bonvenon viziti la ekspozicion en januaro! La adreso de la ĉefbiblioteko estas: Turun kaupunginkirjasto, Linnankatu 2, 20100 Turku. En kafejo Sirius de la biblioteko kolektiĝas lokaj esperantistoj kutime merkrede inter 16.30–17.30. Informiĝu ĉe turku-anoj.

*Tiina Oittinen, prezidanto de EST
tiina.oittinen@pp.inet.fi, tel 050 549 4709*

Okazos ĉe FEJO

FEJO planas organizi iun aktivadon por sia tradicia Solstica Festo, aŭ la 21an de decembro aŭ dum la semajnfino tuj antaŭ ĝi. Ni ne sukcesis decidi konkrete ĝis preso de tiu ĉi gazeto, sed informiĝu interrete, www.esperanto.fi/fejo aŭ demandu de la estraranoj.

En printempo estos, kiel jam dum multaj jaroj, ebleco por du membroj de FEJO partopreni per ŝtata stipendio la Internacian Junularan Festivalon en Italio. Decidon pri la stipendiatoj ni faros verŝajne dum februaro, sed pensu jam nun, ĉu vi volas partopreni.

Sekvu informadon pri IJF rete en <http://iej.esperanto.it/ijf/index.eo.php> (ankoraŭ ne multa informo tie, sed ni esperas, ke baldaŭ pliiĝos). Rakontojn pri aventuroj en kaj lige al pasintjaraj IJF-oj vi povas legi en EF-oj numeroj ekzemple 3/2009, 3/2008, 3/2006, 3/2004 kaj aliaj.

*El estraro de FEJO
Mikko Mäkitalo, makimik@hotmail.com*

Valamo-kurso al la nova jardeko

Valamon kurssi uudelle vuosikymmenelle

27.6.–2.7.2010

Valamon kansanopiston Esperanto-kurssit ovat tunnettuja niin Suomessa kuin maailmallakin. Kuluneen kymmenen vuoden aikana niille on osallistunut yli sata opiskelijaa. Ja ensi vuonna aloitetaan uusi vuosikymmen.

Kesän 2010 kurssin opettajina ovat tutut Atilio Orellana Rojas ja Patrik Austin, jotka yhteistyössä opettavat kaikkia kurssitasoja. Apuopettajana ja kurssivastaavana toimii Tiina Oittinen, joka huolehtii erityisesti retkistä, yhteisistä illanvietoista ja muusta oppituntien ulkopuolisesta ohjelmasta.

Kielikurssiviikko Valamossa ei ole pelkästään luokassa istumista ja opetuksen seuraamista. Oppilaat saavat intensiiviopetusta kaikissa vaiheissa ja voivat milloin vain kysyä jotain mieltään vaivaavaa asiaa opettajilta. Esperantoa käytetään myös tauoilla, ruokaillessa, retkillä ja illanvietoissa.

Aivan kurssin alussa tutustutaan Valamon alueeseen, tietysti esperantoksi oman Valamoppaamme Jukka Laaksosen kanssa. Valamon luostarialueen monipuolinen elämä tulee viikon aikana tutuksi ja mukaan lähtee monenlaisia muistoja. Ensi vuoden kurssiviikolle osuu monta juhlijumalanpalvelusta ja muuta ortodoksisuurakunnan tapahtumaa, joihin voi osallistua.

Ulkomaalaisten osallistujien kanssa on tietysti keskusteltava esperantoksi ja on mielenkiintoista kertoa heille Suomesta ja suomalaisuudesta, esimerkiksi saunailtana. Joka ilta on yhteistä ohjelmaa kuten luentoja, kertomuksia, leikkejä, laulua, musiikkia jne. Oman instrumentin voi ottaa mukaan.

Opiston sauna lämmitetään ainakin kerran

viikossa. Kurssiviikon retkillä käydään matkamiehen ristillä ja hautausmaalla. Sergei-laivalla voi risteillä puhdasvetisellä Juojärvellä. Alueelta voi helposti tehdä retkiä omalla autolla, esim. Lintulan luostariin.

Kesän 2010 kurssi on juhannuksen jälkeisellä viikolla. Kurssi alkaa tällä kertaa jo sunnuntaina, jolloin tutustutaan alueeseen ja vietetään tutustumisiltaa. Oppitunnit alkavat maanantaina klo 9.00, jolloin on ensin kurssin esittely ja ryhmiin jakautuminen. Kurssiviikon hinta on 220–320 e majoituksesta riippuen, hinta sisältää opetuksen lisäksi majoituksen aamiaisineen, retkikahvit ja valamolaisen illan ruokailun.

Ohjelma ilmestyy piakkoin Suomen Esperantoliiton nettisivuille. Sen ja myös Valamon kurssiesitteen saa ottamalla yhteyttä kurssivastaavaan. Suomea osaavat voivat ilmoittautua suoraan Valamoon. Ilmoita kuitenkin myös meille opettajille, että olet tulossa, se on tarpeen kurssin suunnittelussa. Kurssin yhteyshenkilö on kurssivastaava ja liiton sihteeri Tiina Oittinen (puh. 050 549 4709 tai eafsekretario@esperanto.fi, muut yhteystiedot lehden sivulla 2).

Valamon luostarin ja kansanopiston tiedot:

Valamon kansanopisto, Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo. Puh. (017) 5701 810 (myyntipalvelu, klo 9–16), sähköposti: opisto@valamo.fi, kotisivu www.valamo.fi.

Huom! Heinäveden kunnan kotisivuilla on matkailutietoja esperantoksi, katso www.heinavesi.fi

Tervetuloa uudet ja vanhat Valamon-kävijät!

La Esperanto-kursoj en la Popola Instituto de Valamo okazas venontjare jam la 11an fojon. La instruado okazos en mirinda monaĥeja atmosfero, kun kiu jam konatiĝis pli ol 100 homoj dum la pasintaj jaroj. La venontjaraj instruistoj estos denove Atilio Orellana Rojas kaj Patrik Austin kaj Tiina Oittinen agos kiel kursorespondulo kaj helpinstruisto.

Venontfoje la kursosemajno komenciĝos jam dimanĉe, kiam ni konatiĝos kun la areo kun nia esperantlingva ĉiĉerono Jukka Laaksonen. Poste okazos la interkona vespero.

La semajno en Valamo ne estas nur studado en la klasĉambro. Dum la lecionoj ĉio ajn eblas kaj la instruistoj estas je via dispono ne nur tiam, vi povas ankaŭ alitempe konversacii kun ili.

Dum la libertempo estos komunaj vesperoj, ekskursoj en la areo kaj eĉ eksteren, saŭnumado ktp. En la lasta vespero ni havos festan vespermanĝon kun diversa programo. Kunprenu vian

instrumenton, se vi ludas iun. Ankaŭ prezentaĵoj de fotoj ktp. eblas dum la vesperetoj.

Prezo de la kursosemajno estos inter 220 kaj 320 eŭroj depende de la tranoktado. Festa vespermanĝo kaj ekskurska kafo estas inkluzivitaj en la prezo. Se vi parolas la finnan, vi povos aliĝi rekte al la Popola instituto. Bonvolu informi ankaŭ al ni pri via aliĝo, ĉar por la kursoplanado necesas scioj pri la kursanoj.

Kontaktulo estas kursogvidanto Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi. Petu de ŝi aliĝilon. Pliaj informoj ankaŭ en www.esperanto.fi.

Notu! Informoj pri Valamo en ttt-ejo www.valamo.fi kaj pri komunumo Heinävesi en www.heinavesi.fi.

Bonvenon novaj kaj malnovaj Valamo-anoj!



Kursanoj de la kursosemajno en 2008 dum konversacia leciono. De maldekstre: Atilio, Kerstin Kristoferson, Majsja Djakonowsky, Katja Mališeva, Alia Austin, Sirkka Mattlin kaj Lydia Lindla. Mankas de tiu grupo Raimo Jukkola kaj Osmo Kaplas.

Steletto fariĝis 90-jara

Steletto gaje festis sian 90-jariĝon 23.10.2009 kune kun amikoj, kunlaborantoj, blindulorganizoj. En la festo estis publikigita honora titolo "Aganto de Steletto" per kio la estraro membris-inon Irma Heikkilä, kiu dum 30 jaroj prizorgis informadon al viddifektitaj esperantistoj.

Junecan atmosferon kreis Patrik Austin kaj Andrei Dumitrescu de rockbando Dolchamar. Indas menci, ke Patrik kaj Andrei instruas Esperanton en la universitato de Helsinki. Akordionon ludis Tor Hanner, kaj kantis Tri fiŝkaptistoj, nia konata triopo Arvo Karvinen, Aatu Moilanen, Raimo Tanskanen. Sakari Kauppinen, prezidanto de Esperanto-Klubo de Helsinki traktis en sia parolo signifon de lingvo en perado de kulturo. Lastatempe tio estis aktuala temo en la plej granda gazeto en Eŭropo "Helsingin Sanomat".

Prezidantoj de Steletto, Raimo Tanskanen kaj Arvo Karvinen, skizis la pli ol centjaran histo-

riion de Esperanto. En la komenco de pasinta jarcento Esperanto estis instruata en eŭropaj blindul-lernejoj. Notinde estas la granda signifo de Esperanto kiel inicianto de internacia kunlaboro inter porblindulaj organizoj. Kunlaboro progresigis celojn de naciaj blindulorganizoj por krei servojn al viddifektitoj. Esperanto estis komuna lingvo de estroj kaj ili partoprenis Esperantokongresojn kaj kunvenis por paroli pri temoj kiuj ankoraŭ troviĝas sur la aferlisto de Eŭropa blindul-unuiĝo kaj Monda blindul-unuiĝo: studado, profesia edukado, enlaborigo, aliro al scioj, sociaj servoj, integriĝo al socio.

Vivkondiĉoj kaj informeblecoj pliboniĝis. Tamen Esperanto konservis sian rolon speciale kiel peranto de kulturoj. Esperanto-asocioj ĉiujare ofertas centojn da okazaĵoj al plurkulturaj kontaktoj.

Okaze de jubileo Steletto ricevis afablajn salutmesaĝojn kaj donacojn por subteni la aga-



Festo de Steletto finis per Himno. Gastoj legis tekston per brajlo aŭ larĝpresite.

don. Koran dankon!

S-ro Osmo Buller, direktoro de Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, admonas en sia saluto nin esti fieraj pri nia historio kaj akcepti kun granda kuraĝo la defiojn de estontaj jaroj. Tion ni ĉiuj kune faru por daŭrigi Esperanto-kulturon inter viddifektitoj!

Ritva Sabelli

Omaĝo al Irma Heikkilä – Aganto de Steleto

Dum la 90-a jarfesto 23.10.2009 Steleto membris sian fidelan asistanton. Kiel laŭdon pro longa, sindona kaj merithava laboro en la internacia kaj nacia kampoj en la Esperanto-movado kaj respektinda laboro en la blindulorganizoj la estraro de Steleto aljuĝis al Irma la honoran titolon de Aganto de Steleto. Tiu ĉi titolo estis aljuĝita unuan fojon. Kiel konkretan signon pri dankemo Irma ricevis kolĉenon kun verda stelo faritan de steleto-ano Riitta Ekola.

Irma Heikkilä senpage redaktas kaj legas Sonrevuon kaj sindone estas je la dispo de Steleto en aliaj surbendigaj taskoj. Dum 30 ja-



roj Irma admirinde prizorgis informadon al vidualandikapitoj.

Kiel individua membro de UEA kaj EAF kaj kiel aktiva esperantisto Irma havas la plej bonajn eblecojn por utiligi diversajn informfontojn. En ŝi ideale unuigas vastaj scioj pri Esperanto, bona lingvoscio kaj klara prononcado samkiel sindona perado de ŝiaj kapabloj al vidualandikapitaj esperantistoj.

Dankeme kaj dezirante inspiron kaj fortojn en la Esperantujo!

Ritva Sabelli

Kalevala en Turku – ekskurso de E-societo en Turku

En la Arta muzeo de Turku estas dum 25.9–10.1.2010 pompa ekspozicio pri la finna epopeo Kalevala. En la artgalerio estas eksponizita 70 artaĵoj ekde 1850 ĝis 1960. Ili estas el pluraj muzeoj kaj el privataj kolektoj.

La unua eldono de Kalevala aperis en 1835 kaj la pli larĝa eldono, kiun ni konas kiel Nova Kalevala, aperis 1849. Do nun estas festojaro de 160-jariĝo de la epopeo.

Vi ja scias ke ni havas bonegan esperantlingvan Kalevalan, tradukitan de Joh. Edv. Leppäkoski. El ĝi estas farita du eldonoj, en 1964 kaj 1985.

Tie ni, en la impona, granita muzeo-kastelo, rigardante bazajn finnajn artaĵojn, povis aŝskulti esperantan gvidadon. Tiina Oittinen kaj Leena Tiusanen gvidis nin flue, esperante tra la ekspozicio. Ili rakontis multflanke la historion de ĉiuj personoj kaj okazaĵoj laŭ la artaĵoj.

Dum ĉi-tiu multedona ekskurso al la fabela prahistorio ni forgesis eĉ aŭtunan mallumecon. La muzea personaro kaj 14 partoprenantoj aŭdis praktikan uzon de bela Esperanto.

*Dankeme Anja Launiainen
Membro de EST*

Forpasis la livona lingvo

Lingvoj povas malaperi el la mondo, ni scias kazojn, por kiuj tio jam okazis kaj aliajn, kies ekzisto estas minacata. Oni taksas, ke eĉ naciaj lingvoj de malgrandaj ŝtatoj, kiuj havas anojn maksimume kelkajn milionojn, povos baldaŭ esti en minaco malaperi.

Unu tia lingvo estas la latva. Dum tempo de Sovetunio la latva lingvo estis jam preskaŭ iĝanta minoritata lingvo en sia propra regiono, ĉar nombro de ruslingvanoj daŭre kreskis tie. Nun ŝajnas, ke la latva ne estas rekte minacata, ĉar ĝi tamen restis la ĉefa lingvo de memstara Latvio. Interese tamen estas, ke samtempe la latva lingvo forpuŝis kaj anstataŭis ankoraŭ pli malgrandan lingvon en sia regiono, la livonan.

La finno-ugra lingvo livona estis parolata en la nordaj partoj de la nuntempa Latvio. En la unua duono de la 20a jarcento la nombro de livonparolantoj ankoraŭ estis ĉ. mil kaj la lingvo vivis kaj oni publikigis literaturon en ĝi. La decidaj mortobatoj por la lingvo estis la dua mondmilito kaj la popoltransportoj en Sovetunio. La gento suferis en superrulado de du armeoj kaj restis kelkaj centoj da ili loĝantaj dise en diversaj lokoj en Sovetunio.

En februaro 2009 mortis Viktor Berthold, kiun oni konsideris la lasta denaska parolanto de la livona. La lingvo estas bone dokumentita kaj ekzistas homoj, kiuj lernis paroli ĝin, hobias pri ĝi kaj konservas ĝian tradicion, sed apenaŭ plu ni povos iam konsideri ĝin vivanta lingvo.

La livona klare similas la finnan. Ni finnoj povas preskaŭ diveni la signifon de la vortoj en la nacia himno de la livonoj. Kaj kio interese, ĝia strukturo tiom similas la finnan, ke la himno en laŭvorta traduko en la finnan estas tuj kantebla en la sama melodio – la sama kiu estas en la nacia himno de Finnlando, kaj ankaŭ de Estonio.

La himno de livonoj (unua ĉapitro)

Min izāmō, min sindimō,
 ūod ārmaz rānda sa,
 kus rāndanaigās kazābōd
 vel vanād, vizād piedāgōd.
 Min ārmaz ilmas ūod set sa,
 min tōurōz izāmō!

La finna traduko:

Mun isänmaa, mun synnyinmaa,
 oot armas ranta sä,
 miss' rannan ääress' kasvatat
 viel wanhat, viisaat petäiköt.
 Mun armas ainut oot tääll' sä,
 mun kallis isänmaa!

Signifo en Esperanto:

Mia patrolando, mia naskiĝlando,
 estas kara bordo vi,
 kie ĉe l' bordo kreskas
 ankoraŭ aĝaj, saĝaj pinaroj.
 Mia kara sola estas tie-ĉi vi,
 mia kara patrolando!

(mm)

Forpasis Madeleine de Zilah

La 27-an de novembro en 2009 en urbo Creuë pro kor-atako forpasis Madeleine de Zilah, kunredaktisto de "La Gazeto". Ŝi verkis plurajn artikolojn, multe aktivis en OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj), kaj estis membro de la teamo de "La Esperantisto de la Jaro".

fonto: Ret-Info

Aleksis Kiveä esperantoksi

Jorma Ahomäki kirjoitti Turun Sanomien Kirjoittajavieras-palstalla 10.10.2009, Aleksis Kiven päivänä, Seitsemän veljestä -kirjan kääntämisestä esperantoksi. Suomen Esperantoliiton puheenjohtaja Tuomo Grundström kommentoi ja tarkensi tätä Ahomäen kirjoitusta 15.10. ilmeisesti saman lehden yleisönosastossa.

Turun Sanomat kirjoitti myös 27.8.2009 unkarilaisen István Móroczin käynnistä Suomessa. Hän opetti lähes 50 vuotta sitten mm. Kaarinan Rauvolan koulussa esperantoa ja palasi paikan päälle elokuussa 2009 nykyisestä kotimaastaan Sveitsistä.

Laitilan Sanomissa oli 13.10.2009 juttu Móroczin vierailusta Laitilan lukiossa.

Turun Sanomien Kirjoittajavieras-palstalla Jorma Ahomäki kertoi, että Turun Aleksis Kivi-kerhon eräs perustajajäsen Ilmari Ekström oli kääntänyt Seitsemän veljestä esperantoksi 1947.

Intialainen kielitieteen professori Probal Dasgupta Kalkutasta sai tuon kirjan lahjaksi vierailuluennollaan Helsingissä 2005. Dasguptan mielestä esperantonkielinen Seitsemän veljestä pitäisi julkaista uutena painoksena, kun vanha painos on loppuunmyyty. Teos on klassikko ja siksi uusi painos on Dasguptan mielestä tarpeellinen.

Jorma Ahomäen mukaan Ekströmin tekemä taitava käännös kirjasta ansaitsee maininnan Aleksis Kiven päivänä. Seitsemän veljestä on käännetty lisäksi esperantosta heprean kielelle. Tuomo Grundström kertoi Turun Sanomien kirjoituksessa, että Ekström käänsi Seitsemän veljeksensä lisäksi yhdessä Holma Hallin kanssa

Kiven Lea- ja Kihlaus -näytelmät 1920-luvulla. Tuomo kertoi, että Seitsemää veljestä kysytään yhä maailmalla esperanto-painoksena. Siksi EAF on päättänyt julkaista uuden painoksen.

István Mórocz tapasi Kaarinassa nykyisessä Piispanlähteen alakoulussa 50 vuoden takaisia esperanto-oppilaita. He olivat Pekka Raudas-koski, Maija Herlevi, Hannele Suominen ja Pirkko Ilo. Esperanton opetus oli kokeilu, joka jäi pois peruskoulun myötä Kaarinassa. Silloiset oppilaat ymmärsivät kuitenkin nyt kuusi-kymppisinä Istvánin esperantoa. Hän piti kielen oppitunnin myös tämän päivän koululaisille, Piispanlähteen 5B-luokkalaisille, jotka pääsivät jo puhumaan kieltä.

István Mórocz esitteli Laitilan lukion oppilaille esperantoa yhden päivän aikana. Suomessa sitä voi lukea D-kielenä kahdessa lukiossa. Laitilan sanomien jutun mukaan esperanton taitajien määrää on vaikea arvioida, koska kieli ei ole virallinen äidinkieli. Siksi esperantoa osaavia ei tilastoida. Kielen kehitti Ludwik Zamenhof Puolassa päämääränään luoda kansainvälisen viestinnän kieli eikä korvata kenenkään äidinkieltä.

Suomessa István on käymässä kolmatta kertaa ja osaa yhä suomen kieltä. Siitä hän itse ylättyi.

Jutussa on lisäksi tietolaatikko esperantosta. Siinä kerrotaan kielen synnystä ja rakenteista, esperantosta Unescon tukemana kansainvälisyyden välineenä sekä arvioita esperanton osaamisesta maailmassa eri taitotasolla (äidinkieli, sujuva osaaminen, hyvä käyttö, tyydyttävä käyttö ja tutustuminen alkeisiin). Lähteenä oli www.esperanto.fi.

Jukka Noponen



Allan Mehtonen 80-jara

La 14an de novembro 2009 okdekjariĝis la konata esperantisto Allan Mehtonen en Oulu. Li daŭre flue posedas Esperanton kaj ŝatas paroli en ĝi. Kiam Saliko vizitis lin 15.11., sur lia tablo staris familiaj fotoj, inter ili unu pri Stanislawa, rozoj en florvazo ĉirkaŭataj de gratulkartoj. "Mi ne trovas la florojn tiel impresaj kiel la virinoj, sed mia opinie la virinoj mem estas kiel floroj", ŝercis li Esperante.

Saliko

70-jara Saliko

Oni festis la 70-jariĝon de Saliko en la Esperanto-oficejo en Helsinko la 24an de novembro 2009. Fotis Jorma Kasanen.



Jula prediko

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis novaĵon el Svisio: la svisa popolo en referendumo decidis postuli malpermeson konstrui minaretojn en la lando.

La rezulto tuj renkontis dubojn, ĉu ĝi povos esti realigota. Ĉu ekzemple la internaciaj kontraktoj por homaj rajtoj en siaj difinoj pri rajto praktiki religiojn malebligos tian malpermeson?

Se oni difinas, ke rajto por religio estas tiom absoluta, ke homo havas rajton praktiki kiun ajn postulon, kiun religio difinas, kaj ke la islama religio postulas minaretojn, tiam la malpermeso pri minaretoj evidente konfliktus kun rajto pri religio.

Tiu rezonado ja estas fuŝa. Islamo ne nepre bezonas minaretojn, en eŭropaj urboj funkcias multaj moskeoj sen minareto, sen iu ajn ekstere videbla klara signo pri tio, ke ene estas moskeo. Krome la rajto praktiki religion ne estas tiom absoluta: ekzemple la eŭropa kontrakto por homaj rajtoj difinas, ke ĉiu homo havas liberon pri religio, *sed* ke oni povas meti por libero pri religio tiajn limigojn, kiuj estas nepraj por sekurigi ĝeneralan socian sekurecon aŭ la rajtojn kaj liberecon de aliaj homoj.

Se la svisoj demokratie decidas havi malpermeson pri minaretoj, ili havu sian malpermeson. Leviĝas nur la demando, ĉu ankaŭ aliaj religiaj monumentoj en publikaj sferoj indos iĝi malpermesataj.

Sen respondi al tiu demando, mi inversas la demandon: Ĉu indas montri religion per monumentoj en publika sfero? Kial indus? Ĉu religiaj monumentoj havas iun alian funkcion ol partigi la homaron: *ni* kunvenas ĉe tiu ĉi monumento, *ni* estas unu grupo, *tiuj* kunvenas ĉe alia monumento, *ili* estas alia grupo?

Jam nia konata Zamenhof konvinkigis, ke ne indas partigi la homaron, oni povas senti sin unuavice homarano. Pri tio mi instigas ĉiujn almenaŭ pensi, kvankam multaj homoj krom homaranismo evidente bezonas ankaŭ iun specifan religion. En nia malluma nordlanda jultempo estas bone pensi pri aferoj – vere nur trankviliĝi, kvietiĝi kaj pensi. Por tio instigas nia tuta naturo, kiu nun ĉefe kvietas kaj nur atendas, ke turniĝo de la terglobo denove komencigas pli fervoran vivon.

Mikko Mäkitalo

Forpasis Matti Pyhälä

La 25an de oktobro 2009 forpasis la edzo de ”Saliko”, subite kaj neatendite, en la aĝo de 71 jaroj.

Li estas enterigita en Oulu, kie li naskiĝis la 9an de aprilo, 1938. Kvankam li ne estis fervora esperantisto, li tre ŝatis esperantistojn kaj parolis en Esperanto, kiun li lernis aŭskultante Salikon interparoli kun siaj geamikoj. Li konsentis kun la internaj ideoj de nia internacia lingvo kaj kunplezure partoprenis en E-eventoj en Finnlando kaj eksterlande, kie li povis utiligi sian scion pri aliaj lingvoj. De hejmlandaj kaj fremdlandaj geamikoj venis kondolencaj kartoj, kie oni diras pri li, ke li estis lerta ŝerculo, bonvivanto kaj prononcis francan kaj rusan lingvojn kvazaŭ kiel denaskulo. Li membris en la E-klubo de Jyväskylä, en EAF kaj UEA. *Saliko*



Aperis nova elementa lernolibro de esperanto.

Verkita por lerneja uzo, ĝi bone taŭgas ankaŭ al memlernado, ankaŭ de plenkreskuloj.







Uusi esperanton alkeiskirja

Stano Marček,
suomeksi toimittanut
Tuomo Grundström:
Esperanto mutkattomasti

114 sivua, 18 x 25 cm


Runsaasti kuvitettu kirja on laadittu koulukäyttöön, mutta sopii hyvin myös itseopiskelijalle, aikuisellekin.

Hinta 10 euroa + lähetyskulut. Tilaukset Suomen Esperantoliitosta, Siltaasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, tai eafmendoj@esperanto.fi

		
rozo	Rozo ¹⁰ estas floro ¹¹ .	Pomo ¹² estas frukto ¹³ .
	Kaj	
pomo	1 + 1 = 2	
+	Unu ¹⁴ kaj ¹⁵ unu estas du ¹⁶ .	Maria kaj Peter.
kaj		Pomo kaj libro. Kato estas besto kaj rozo estas floro. Mi estas Maria kaj vi estas Peter. Tablo estas objekto kaj ĉevalo estas besto.
1	Ne	
unu	1 + 1 ≠ 3	Unu kaj unu ne ¹⁷ estas tri ¹⁸ .
2		
du		
≠		
ne		
3		
tri		
○		

Enhavo – Sisällysluettelo

Johdanto	5
1. Unua leciono: Estas, kaj, ne, kio, tio.	7
<i>Kirjaimet. Ääntäminen ja painotus.</i>	
2. Dua leciono: ĉu, jes, ne, sed, ankaŭ, la, kie, sur, li, ŝi.	11
<i>Konversacio.</i>	
3. Tria leciono: Kia, mal-, en, apud, sub, super, kiu, mi, vi, li, ŝi, ĝi.	15
<i>Konversacio.</i>	
4. Kvara leciono: Mia, via, lia, ŝia, nia, ilia, -ino, -j.	20
<i>La familio. Pelataan.</i>	
5. Kvina leciono: Al, de, nun, tiu, tie, havas ... -n.	24
<i>En la ĉambro. Pelataan.</i>	
6. Sesa leciono: 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, kiom, kun, sen, per.	28
<i>La homa korpo. Anekdoto.</i>	
7. Sepa leciono: -as, -is, -os, semajno, antaŭ, post, kiel, ...-e, ĉar.	31
<i>Konversacio.</i>	
8. Oka leciono: -i, -u, da, ge-, kial, ĉar.	35
<i>Malgranda knabo. Pelataan.</i>	
9. Naŭa leciono: -ejo, -isto, -anto, ĉe, inter, el, pli, plej.	41
<i>malpli, malplej. Numeraloj (Lukusanat). Nia familio.</i>	
10. Dek-a leciono: Kalendaro, kiam, kiom, kioma, je, dato.	47
<i>-aro, ĝis, si, sia. Peter skribas leteron.</i>	
11. Dek-unua leciono: Io, ĉio, nenio, iu, ĉiu, neniu, -ig-, -iĝ-.	52
<i>La sezonoj. La jaro. La semajno. Pelataan.</i>	
12. Dek-dua leciono: Tia, ia, ĉia, nenia, ie, ĉie, nenie, iam.	57
<i>ĉiam, neniam, -eg-, -et-. Mateno. Proverboj.</i>	
13. Dek-tria leciono: -ilo, ek-, kies, ke, oni, tiom, iom.	61
<i>En la klaso.</i>	
14. Dek-kvara leciono: -ido, kien? ...-n, pri, tial, tiel, ajn, ĉi.	65
<i>Vespero. Proverboj. Pelataan.</i>	



Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☎ onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☎ www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallioaamankatu 10, 15150 Lahti. ☎ martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ <http://esperantooulu.info/> olli.pajula@gmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ☎ tapani.aarne@mbnet.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimi-to. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☎ steleto@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta. Aktiivisia harrastajia on mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2010

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
1	10.1.	15.1.	5.2.
2	10.3.	15.3.	5.4.
3	10.5.	15.5.	5.6.
4	10.7.	15.7.	5.8.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Esperantolehden yhteiskortti

Lahjatilaus: vuosikerta ____.

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _/ _.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _/ _ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

Kestotilaus vuosikerrasta ____ alkaen.

Tilaus: vuosikerta ____.

Tilaaajan, kestopilaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

**Posti-
merkki**

**Suomen
esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki**

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Jutut 15.1.2010 mennessä päätoimittajalle. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 15.1.2010 al la ĉefredaktoro. Osoite/adreso: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku, puh/tel. (02) 2373 848, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini, Tampere 2009